

# ESPERANTO TRIUMFONTO

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).  
W. M. Page, adv., Edinburgh.  
E. Archdeacon, gen. sekr. de Tour Club de France, Paris.  
Teo Jung, Köln (Kolonjo).  
G. van Heek, Hengelo.  
Frans Schoofs, Antwerpen.  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Literatura redaktoro: Zanoni.

**ADMINISTREJO:**  
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.  
Germ. poŝtĉeka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.  
Manuskriptojn oni skribu sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtm. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

**ABONEJOJ**  
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiuj stacidomaj gazet-vendejoj, hoteloj, kafejoj kaj restoracioj.  
Komercal ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.


**JARABONO:**  
3 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 svisaj frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaj aŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 liroj, 70 rumanaj markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 60 germ. mk., Estonio 40 germ. mk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por krom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 15. Nachtrag, Ergänzungsheft 5, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 15 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln Horrem, Germanio. (Ĉiu numero banderolita 1,25 mk.).

**ANONCOJ**  
kostas po cm<sup>2</sup> (kvadratenilmetro) 1,50 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 50% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%). ANONCETOJ kostas por 1-2 foja espraso kaj 25 vortoj dekonon de la jarabono aŭ 6 respond-kuponojn; por 3-5 foja espraso ni kalkulas la duoblon. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto (5 n-oi). — Familiaj anoncoj (naŝkiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazantaĵoj (ĉefkunado, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.  
En korespondaj anoncoj ni forstrekas ne-necesaĵojn kaj naŭvaĵojn.

Numero 57. Edinburg, Paris, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas, 6. Nov. Jaro 1921.


## „Esperanto Triumfonta“ en Svislando.

Ni komunikas al niaj legantoj en Svislando ke la firmo Naville & Cie., Agence des Journaux, aranĝis la opan vendadon de ET en la urboj Genève, Mon-



Al la artikolo „La Livoj“: Vidaĵo de la liva vilaĝo Sikrog.

treux, Lausanne, Neuchâtel, Le Locle, Chaux de Fonds kaj Lyss. Ankaŭ en Bern, Zürich kaj Locarno ET estas aĉetebla en kioskoj aŭ stacidomoj.



Al la artikolo „La Livoj“: Salumitaj fiŝoj estas portataj al fumigado. La mastro akriĝas falĉilon.

### La Livoj.

Eble multaj legantoj nenion scias pri malgranda liva nacio. Ne ĉiam ĝi estis malgranda kaj malforta. Antaŭ ok jarcentoj al livoj apartenis la tuta marbordo de la golfo de Riga (ĉe Baltika maro). Ili estis tre militemaj kaj, havante grandan ŝiparon, eĉ malhelpis la danojn kaj svedojn. Nenlu el la najbaroj provis ilin submeti al si. Fine venis bone armataj germanoj el Lübeck kaj Bremen. Sub la standardo de Dipatrino ili komencis bataladon kontraŭ la idolanoj, t. e. la livoj, estonoj kaj latvo-litovaj gentoj. Post longa, vana kontraŭstaro la livoj estis submetataj kaj sklavigataj. Poste la historio nenion parolas pri ili.  
Dank' al la preferado de latvoj, la livoj perdis sian naciemon kaj lom post iom latviĝis. Restis nur kelkcentoj da ili, kiuj nuntempe loĝas en Kurlando (depart. de Latvio) ĉe Domesnes. Eble en baldaŭa estonteco mortos la lasta livo kaj kun li la tuta nacio.  
Tion tre helpis la lasta, granda mondmilito. La hejmoj de la livoj estis ruinigataj, kaj la popolo disigata. Loĝante inter fremduloj, ili forgesas sian gepatran lingvon kaj siajn morojn. Tiu, kiuj estas reveninta, fartas malbone, ĉar ne ekzistas iloj por agrikulturo kaj fiŝkaptado.  
La vivanta generacio mortos ankoraŭ kiel liva, sed la idoj hontas esti livoj kaj paroli live. Eĉ nun multaj patrinoj instruas al siaj infanoj nur latvan lingvon. Ili ja estas devigitaj fari tion, ĉar ĉi: en preĝejoj, lernejoj ktp., regas nur fremda

lingvo. Sian literaturon la livoj neniam havis. Ekzistas nur traduko de evangelio de Sankta Mateo.

Sed malgraŭ ĉio en estanta jaro inter la livoj kreskas la ideo pri aŭtonomio de liva marbordo. Ili ne volas troon, nur ke Latvia registaro permesu al liva vilaĝoj unuigi kaj fondi lernejon por liva infano. Por ke tio ebligu, Estona Akademia Societo de Gepatra Lingvo venigis du livajn junulojn al Tartu (Dorpat), kie ili ricevas livlingvan instruadon ĉe loka instruista seminario.  
Sed Latvia registaro, kiu devus plej multe zorgi pri ekzistado de malgranda nacio, ĝis nun nenion respondis al demandoj de la livoj. Tia agadmaniero de latvoj ne estas honesta. Liva nacio ne devas morti, ĉar ĝi estas vivanta muzeo, de kiu oni ricevas multvalorajn klarigojn al finnugra lingvistiko kaj historio. Ĝi ekzistu ankoraŭ por venonta jarcento!  
P. Ahula.

Rim. de Red.: La fotografaĵoj, laŭ kiuj estas farita la ilustraĵoj, estas afable disponigitaj al ni de la Estonio Muzeo en Tartu (Dorpat) pere de prof. Kettunen.

### Justeco al ĉiu.

Apliki justecon tiel al niaj amikoj, kiel ankaŭ al niaj kontraŭuloj, devus esti nia plej sekvinda virto. La redaktoro kaj la recenzantoj de ET ĝis nun klopodis kaj ankaŭ estonte ĉiam klopodos sekvi tiun virton laŭ sia plej bona volo kaj scio. Se foje pro nesacio aŭ erarkompreno ili priskribis, raportis aŭ recenzis ion neĝuste aŭ laŭŝajne ten-

dence (sed nelintencie), ili volonte konfesos kaj korektos la neĝustojn aŭ eraron. Neniam kaj neniel oni povu riproĉi nin por maljusta aŭ malhonestaj agmanieroj.

En n-o 53 ni publikigis sub surskribo „Bona miemo, malgraŭ malbona situacio“ kun komentario artikoleton, kiu aperis en la franca ĵurnalo „Le Progrès Civique“. Nun la verkinto de tiu artikoleto, s-o L. M. de Guesnet, 83, rue Rochecouart, Paris 9, sekr. de la Société Française Idiste, skribis al ni, ke la originala artikoleto sendita de li al la redakcio havis alian tekston, ke la redakcio — verŝajne „por ne ĉagreni esperantistajn amikojn“ — tute ŝanĝis la artikoleton, kaj ke do la idistoj jam ne povas esti respondecaj pri ĝia enhavo.

En n-o 54 de ET aperis ne tre favora recenzo pri latin-esperanta gramatiko de sac. Bianchini, en kiu speciale estis kritikataj la klarigoj pri prononcado. Pro tiu recenzo alvenis kelkaj kontraŭartikoloj, kiujn ni pro diversaj kaŭzoj (manko de loko, parta neafereco kaj polemikemo aŭ eĉ malĝusteco) ne povas komplete publikigi. Ni nur elĉerpos la esencajn klarigojn.

Oni skribas, ke la prononclarigoj de sac. B. estas fidele donitaj laŭ la pronunco de la latina lingvo ĉe italoj. Sed tio ja ne povas esti senkulpigo, ĉar la aŭtoro certe scias, ke latina lingvo estas en la diversaj landoj diversmaniere prononcata; do li devus almenaŭ doni la klarigojn laŭ la pronunco de latina lingvo ĉe la antikvaj romanoj mem, t. e. pronunco proksimume tia,

### La tri Fundamentaj Reguladoj.

La unua el la du plej urĝaj taskoj de la esperantologio. De Eugen Wüster.

(Daŭrigo.)  
b) Eble, ke la identaĵo -a = -ec- ne valorus pri la nombrovortoj; ke ekz-e por „unu-a-o“ oni devas diri „unu-a-eco“ (kiel Michel en la Scienca Revuo 1907, p. 335), ĉar unu-eco jam havas alian sencon. Sed ĉar tiu fakto devenas el — per si mem arbitra kaj tial cetere forigita en ldo — specialigo de la ideo de -a kaj ĝia reĝeneraliĝo sub la signo -ec- kaj koncernas tute determinitan kategorion de vortoj, tio ne ŝajnas al ni kontraŭargumento.

Por la procedo laŭ la fundamenta propozicio de pluformado krom ĉio jam dirita ankoraŭ pledas, ke per tia procedo oni ofte ricevas kunmetojn, kies nacilingva korelativaĵo en la loko de -ad- havas ĝian etimologian ekvivalenton -at- resp-e (en la hispana lingvo) -ad-; ekz-e transform-ad il(o) \*) = (F) G (I) R transform-at-or kaj H eĉ transform-ad-or.

4. Precepte pro neklara konscio de la esenca diferenco inter primitivaj kaj neprimitivaj radikofinaj-o-vortoj multaj — sed preskaŭ ĉiam nur mez-kvalitaj — esp-istoj malgraŭ ĉio ankaŭ ĉe la pluformado de neprimitivaj vortoj simple forjetas sen anstataŭado la finajon kaj do kune la ideon en ĝi entenitan. Ili ekz-e diras ŝtat-igi — kio povas esti nur igi ŝtat(o) — anst. ŝtat-ec-igi aŭ „ŝtat-a-igi“ ktp.; ŝajnas superflue pruvi, ke tiu vojo ne estas irebla.

\*) Komp-u la troviĝantan en la unua artikolo rimarkigon pri la disigo de kunmetitaj vortoj en vortoduonojn.

Tamen ekzistas du kazoj, en kiu tia elipso, t. e. ellaso de gravajo, estas pravigebla kaj eĉ rekomendinda:

a) antaŭ sufikso, kies uzo laŭ la konvencio pri ĝia maldekstrafianka interelementa rilato estas ebla nur ĉe antaŭiro de unu ĉiam sama, el la tri plej ĝeneralaj ideoj gramatikaj, ĉu esprimita aŭ ne; ekz-e antaŭ la participaj sufiksoj aŭ antaŭ -abl- la verba finaĵo estas forjetebla sen anstataŭado, tiel ke „martel-i-anto“ fariĝas simple martel-anto kaj „martel-i-eb-la“ fariĝas martel-eb-la). El tio ankaŭ rezultas, ke simile kiel -ad- por la pluformado ofte estas uzebla la adjektiva sufikso -ant-.

b) kondiĉe, kiam la ellaso liveras ideon kiel tutajoj pli malpli identan kun la celata kvankam diferencan laŭ la konsisto, laŭ la aspekto (flanko de konsidero): ĉe ebleco de alikonsistigo de la rezultanta ideo. Tiel regigi kaj regadigi (reg-antiĝi) ja ne montras ideon plene identan, sed tamen tiom similan, ke plejofte la unua formo sufiĉas; simile ofte pri briligi kaj brilecigi kaj multakaze pri rapidigi kaj rapidadigi (rapidantiĝi).

### III. Kompenso de la manko de atributa sufikso de enteco.

(Finaja pluformado de neprimitivaj substantivoj.)

Ento estas tio, kio estas, filozofia est(anti)aĵo; komunlingva „estaĵo“ ordinare estas vivanta ento, t. e. organismo (animalo aŭ planto). Por esprimi tiun konceptojn ekzistas en Esp-o du neradikaj vortelementoj: la finaĵo -o kaj la sufikso -aj-. Sed estas inter ili esenca diferenco kaj ni tuj diru anticipe, ke ĉi-foje estas nur unu (almenaŭ ideo) ĝenerale aplikebla rimedo de pluformado (rim. 2),

\*) Vidu ankaŭ la piednoton pri nombradobila.

dum ĝenerale aplikebla aparta pluformadilo de -o mankas: mankas sufikso analogia al -ec- kaj -ad-.

La nereguliteco de la pluformado ree esprimiĝas ankaŭ per tio, ke por la pluformitaj ideoj oni uzas elradikajn vortojn, eĉ vortojn kun etimologie malsamaj radikoj, ĉar pro samaj kaŭzoj okazas same en la naciaj lingvoj; sed kiel por la rusa lingvo, de kiu Esp-o ja adoptis la emon al uzo de substantivo-adjektivoj, ĉe adjektiva pluformado tio preskaŭ neniam estas necesaĵo, ankaŭ Esp-o devus celi povi mem adjektive pluformi ankaŭ la neprimitivajn substantivojn (san-o, mov-o). El specialaj radikoj ni citas: sanifar (a) k. higien-a por „san-o-a“ (A san-it-ary, F san-it-aire, G gesund-heit-lich); termik-a kaj kalorik-a por „varm-o-a“ (R teplovoj de teplo(ta), varmo), akustik-a por „aud-o-a“ (R sluh-ovoj); erotik-a por „am-o-a“ (R ljubov-nij); heŭristik-a por „trov-o-a“; kinetik-a por „mov-o-a“ (R dvigat-el-nij; -el = anto-); optik-a por „vid-o-a“ (R zrit-el-nij).

Se oni ne insistas pri la ĉiam uzeblo de la rimedoj de pluformado, sufiĉe multaj ekzistas:

1. ree la uzo de la analiza formo. Ekz-e oni povas diri, ke la energio ŝajne perdiĝanta ĉe interfroto iĝas varm-o. La analiza formo de la adjektivaj pluformitaĵoj estus ricevata, se oni anstataŭas -a por ĝia kvazaŭsinonimo de; ekz-e „varm-o-a“ = de (la) varmo (malvarm-o-tekniko — v. sub 2 — = FHI tekniko de malvarmo). Sed, kiel jam montrita en la II-a parto, la pluformado estas tre limita; oni tiel apenaŭ povus diri isto de san-o por „san-o-isto“.

2. ree la internvorta konservo de -o. Oni tiel havus san-o-a por sanitara, san-o-isto (komp-u la similsignifan mal-san-ul-isto) por sanitaristo, varm-o-igi por ŝanĝi en varmon, sen-mov-o-a

por estanta sen movo, kontraŭ-milit-o-ul(o) por kontraŭulo de (la) milito ktp.

Tiu rimedo de pluformado pure ideo estas ĉiam aplikebla — kiel sola —, kaj ni en nia artikolo ja ankaŭ diris, ke ĝi povas montri la celatan konceptojn. Tamen al la kontraŭargumentoj prezentitaj jam en la II-a parto ĉi tie aligis ankoraŭ, ke pro la manko de analogiaĵo al -ec- kaj -ad- la finaĵo -o devus esti konservata krom antaŭ sufiksoj eĉ antaŭ finaĵoj kaj al tio, pro praktikaj kaŭzoj (t. e. la akcento, homonimoj), oni ne facile povus decidiĝi.

La antaŭradika konservo de -o jam hodiaŭ estas ĝenerala kutimo kaj povas servi bone kiel kompenso de la manko de substantivo-adjektivoj. Procedante tiel oni imitas nur la germanan lingvon, por kiu tia formado de kunmetitaj en la malvasta senco vortoj estas karakteriza, ĉar ĝi havas speciale malmultajn (t. e. malpli multajn ol la lingvoj AFR) malfremdradikajn substantivo-adjektivojn; ekz-e por „malvarm-o-a“ tekniko (R holdo-il-naja tekniko) oni diras malvarm-o-tekniko (G Kält-e-technik v. sub 1). Per tiaj radikokunmetitaj kune kun anastrofo (ordrenverso) oni ankaŭ povas eviti la elipsojn ĉe la kompletigitaj prepoziciaj formitaĵoj, cetere sekvanante nacilingvaj modelojn. Tiel Franke (en la poemo Ĉu vi konas...?, Germ-a Esp-isto 1915, p. 66) uzis fort-osen-a (G Kraft-los, A power-less) por senfort-ola (F a(f)-faibl-i aŭ a-stén-ique, R bez-sil-nij); alla ekz-e estas milit-o-kontraŭ-ulo (G Kriegs-gegn-er) por kontraŭ-milito-ulo (G Anti-militar-ist).

3. aparta sufiksa pluformadilo de -o (analogie al -ec- kaj -ad- kiel pluformadiloj de -a kaj -i), kiel ni jam diris, ne ekzistas pro la esenca diferenco inter -o kaj -aj. Tiu diferenco konsistas



kian nun aplikas la germanaj universitatoj; ekz.  $c = k$  kaj neniam  $c$  aŭ  $ĉ$ . Se do germana pastro lernus laŭ la gramatiko de s-o B., li elparolus sian Esperanton je preskaŭ nekomprenebla maniero, ekz. anstataŭ „ĉi ŝanĝis tion“ li eble pronuncus „ihl (greka „Theta“) skanĝis kion“.

La gramatiko de sac. Bianchini certe estas interesa, kaj ĝi estos utila kaj tute rekomendinda, se li presigos du-paĝan folieton kun korekto pri la pronuncado, pres- kaj (malmultaj) gramatikaj eraroj kaj kelkaj malbonaj frazoj.

La recenzestro de ET (s-o G. Ajul) estas unu el la plej malseveraj kritikantoj. Jam kelkfoje oni komisitis al li recenzii librojn, kiujn aliaj recenzantoj rifuzis recenzii pro ilia evidenta malboneco. Do kulpigi nian recenzanton pro maliceco aŭ aroganteo, kiel faris kelkaj personoj, estas maljuste.

Justeco al ĉiuj Justeco al aŭtoroj, sed justeco ankaŭ al recenzantoj, kaj eĉ al kontraŭuloj.

Ni aldonu ankoraŭ, ke ĉiuj koncernataj personoj estas tute honestaj homoj, tiel s-o Aio, la ensendinto de la artikolo en n-o 53, kiel s-o Bianchini, tre sperta teologo kaj fervora esperantisto, kiel ankaŭ s-o G. Ajul, nia recenzanto, esperantisto de 14 jaroj kaj tre lingvosperta (li estas ankaŭ redaktanto de la „Ekzercaj Taskoj“ en „Esperanto-Praktiko“).

Interesa fakto ĉe la diskuto pri la gramatiko de s-o B. estas la konstato, ke la latina lingvo, la sola „natura“ lingvo, k’ni oni povas konsideri kiel internacian lingvon, estas internacia jam nur laŭ la skribo sed ne laŭ la pronunco.

T. J.

## XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko-Helsingfors, Finnlando en aŭgusto 1922.

### Unua Komunikilo.

1. **LKK.** La Loka Kongresa Komitato, elektita de la Estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando, konsistas el jenaj personoj: S-o Albin Sandström, prez., Lektoro K. S. Ahonius, vicprez., s-o Vilho Setälä, ĝen. sekr., s-o G. Cernohvostov, sekr. kaj s-o Leo Jalava, kasisto.

2. **Adreso.** La oficiala poŝta adreso de la Kongreso kaj de LKK estas: XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinko (aŭ Helsingfors), Finnlando. Ĉiuj korespondadoj, koncernataj la kongresajn aferojn, ankaŭ mensendoj, estu adresataj nur al tiu adreso. Telegramadreso estas: Esperanto, Helsingfors.

3. **Aliĝo.** Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XIV-a, estas petataj uzi la aliĝilojn eldonotajn de la LKK. La aliĝiloj estos dum novembro-decembro dissendataj al la plej multaj esperantaj gazetoj. Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilojn, petu ĝin de la LKK.

Samideanoj, kiuj jam nun aliĝas, sed pro ne antaŭviditaj kaŭzoj tamen ne povos ĉeesti la kongreson, ricevos, se ili ne volas fariĝi helpkongresanoj, 75% de la pagita kotizo, se ili pri tio sciligas la LKK antaŭ la 1-a de julio 1922. Pri kurza diferenco la LKK tamen ne respondas.

En la kongresan nomaron estos enskribitaj nur la personoj, kiuj aliĝis kaj pagis la kongresan kotizon.

Ĉar por la bona prosperado de la porkongresaj laboroj estas tre necese, ke la LKK jam tuj en komenco havu je sia dispono sufiĉe da mono, la samideanoj-aliĝintoj estas serioze petataj kiom eble plej baldaŭ aliĝi kaj pagi la kotizon.

4. **Kotizo.** La fikso de la Kongresa Kotizo estas tre malfacila al LKK. Ni konsideris, ke la sumo efektive pagota de la alivalutaj landoj povas esti pli alta ol tiu pagota de la malbonvalutaj,

tamen ne tiel, ke la lastenomnitaj kaŭzoj puran malprofiton al la kongresa kazo. Tiel serĉinte lan mezon, ni venis al jena tabelo:

4 dolaroj, 12 guldenoj, 20 ŝilingoj, svisaj frankoj, skandinavaj kronoj, pesetoj, 25 francaj kaj belgaj frankoj, 30 liroj, 50 finnaj markoj, 60 germanaj markoj, Ostmarkoj, ĉeĥaj kronoj, bulg. kaj rum. leoj, 80 dinaroj kaj drakmoj, 150 hungaraj kronoj, estonaj markoj, litvaj rubloj, 300 aŭstria kronoj, 500 polaj markoj.

Ĉiuj pagas en la mono de sia lando. Samideanoj el landoj kun aliaj monunuoj krom la suprenomitaĵo pagu aŭ dolarojn, ŝilingojn aŭ frankojn aŭ petu pri speciala aranĝo.

Piuj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizo.

Post la 1-a de junio 1922 la kotizo altiĝos je 50%.

5. **Helpkongresanoj.** Samideanoj kiuj ne havos okazon ĉeesti la XIV-an kongreson, povas tamen helpi al ĝia bona sukceso, aliĝanta kiel helpkongresanoj. La helpkongresano pagas la kongresan kotizon kaj ricevos la kongresan insignon kaj ĉiujn kongresajn dokumentojn.

6. **Garantia Kapitalo.** Por certigi la ekonomian rezulton de la XIV-a estas fondata speciala Garantia Kapitalo, al kiu la samideanoj estas petataj noti garantiatojn po almenaŭ fmk. 300. La garantiitaj sumoj estos enkasigitaj nur en la okazo,



Al la artikolo „La Livoj“ (vidu pĝ. 1).

Familio Adamson, ankoraŭ parolanta live.

Maldekstre: 80-jara liva draŝisto.

ke la kongresaj elspezoj superos la enspezojn, kaj proporcie laŭ la ebla malprofito.

7. **Donacoj.** Sub ĉi tiu rubriko ni notas donacojn, faritajn al la Kongresa Kazo. Ĉar la organiza elspezo estas tre granda, kaj nur parte povos esti repagataj per la kongresa kotizo, la LKK sin turnas al ĉiuj samideanoj, petante monsubtenon sub ĉi tiu rubriko.

8. **Depono de mono.** Laŭ interkonsento, kiun faras LKK kun la kongresa banko (nomo scilgita en la venonta komunikilo), la samideanoj, kiuj deziras uzi la nunan ire favoran kurzon por rezervi al si finnajn markoj, povas tuj sendi monon al la kongresa kasisto (sub la oficiala adreso de LKK) kiu ŝanĝos ĝin en finnajn markojn kaj malfermos konton por la aliĝinto. Alvenante ĉi tien dum la kongreso, la aliĝinto-deponinto povos libere disponi sian monon. La banko nuntempe pagas 7% renton por deponita mono.

Pro la nuna malalta kurzo de la finna marko estas precipe por samideanoj en landoj kun alta valuto tre rekomendinde uzi ĉi tiun okazon havigi al si sufiĉe malkaran monon por la restado ĉi tie dum la kongresada semajno.

La LKK ankaŭ jam nun volas atentigi al la estontaj kongresanoj pri tio, ke oni ĝenerale devus eviti sendon aŭ alporton de papermono, ĉar ŝanĝante papermonon oni ĉiam perdas en kurzo. Precipe en Finnlando eksterlanda papermono ne estas volonte akceptata de la bankoj. Ni konsilas al la aliĝintoj laŭeble sendi kaj kunporti monon nur per bankĉekoj aŭ per kreditletoj. Pro la tre malalta kurzo, uzata de la poŝto, ni insiste malkonsilas sendon de mono per poŝtmandato kaj respondkuponon.

9. **Fakaj kunsidoj.** Personoj intencantaj kunvoki specialajn fakajn kunsidojn dum la kongreso, estas petataj pri tio kiom eble plej frue informi la LKK samtempe sciligante, por kiom da personoj proksimume ili bezonas ĉambron kaj dum kiom da horoj. En la sekvantaj komunikiloj estos sciigite, al kiuj personoj LKK komisios la lokan organizon de la diversaj fakaj kunsidoj.

10. **Ekspozicio.** La LKK intencas aranĝi dum la kongresa semajno grandan publikan propagandan ekspozicion pri Esperanto.

Por ke ĉi tiu ekspozicio fariĝu kiom eble plej valora, instrua kaj impona, samideanoj ĉiulandaj estas urĝe petataj donace sendi al LKK en Esperanto eldonitajn presadojn, prospektojn, katalogojn, gvidlibrojn, gazetojn, librojn, sigelmarkojn, poŝtkartojn kaj aliajn ekspoziciindajn esperantajn.



Al la artikolo „La Livoj“ (vidu pĝ. 1).

Familio Adamson, ankoraŭ parolanta live.

Maldekstre: 80-jara liva draŝisto.

Personoj, kiuj posedas gravajn, maloftajn dokumentojn, precipe pri la unuaj tempoj de Esperanto, kiujn ili ne povas donaci, estas tamen petataj pruntedoni la dokumentojn al la LKK, kaj ricevos ilin post la kongreso.

11. **Propagando.** Por fari tre bonan propagandon pri la kongreso, la samideanoj estas petataj kiel eble plej multe aĉeti kaj uzi la kongresajn poŝtkartojn kaj sigelmarkojn, baldaŭ eldonotajn.

12. **Sciigoj al aliĝintoj.** La LKK sendos ĉiujn kongresajn komunikilojn presitaj al ĉiu aliĝinto kaj al la esperanta gazetararo.

14. **„Esperanta Finnlando.“** Laŭ interkonsento farita inter la LKK kaj la administracio de „Esperanta Finnlando“, la kongresanoj ricevos la nomitan gazeton je specialaj favorprezoj, se ili abonos ĝin samtempe, kiam ili aliĝas al la kongreso.

La Loka Kongresa Komitato de la XIV-a

### Aliĝoj.

1. W. M. Page, Edinburgh, Skotlando.
2. J. M. Warden, Edinburgh, Skotlando.
3. S-ino E. F. Cense, Paris, Franc.

## Requiem.

Verrakonto pri blinda muzikisto.

De *Hjalmar Höglund.*

El la sveda lingvo esperantigis *Harald Thilander.* (El „Esperanta Ligilo“.)

(Fino.)  
Sed tio estas pereema. Post kelkaj jaroj li estis denove sen edzino. Denove li estis sur tiu sama sturpunkto; nenio estis ŝanĝita, li nur ricevis ankoraŭ unu malĝojon por elporli. La novaj akordaroj estis prenitaj firmajn formojn, la tuta granda verko estis preta kaj elpolurita, sed nun li devis denove portadi ĝin, kiel oni portadas embriajon nenaskitan. Ĉu tio lin rompis? Eble ne. Sed dum tiu tempo de kontraŭaĵoj li mem estis kuŝigata sur sian lastan liton malsanulan.

Ian tagon mi sidis apud lia kuŝejo kaj interparoladis kun li.

„Kaj kiel estas al vial komponaĵoj?“

„Kara amiko, ili estas enkapsuligitaj. Sed alle mi ludis ĝin al mi mem, sed nun mi ne havas mian edzinon, kiun ĝin notus. Cetere nun temas pri „Te Deum“, kaj ne bone decas, kanti „Te Deum“, dum la mondo martsangadas. Mi devas atendi ĝis post la milito.“

„Sed se... se vi mem ne havus tempon por atendi?“

Li ridetis pacecan rideton.

„Tiam mi ĝin kunprenos tien, kien mi iras. Kion neniu aŭskultis, pri tio neniu sentos la foreston. Mi ne komponadis por gajni laŭdon sed nur por la ĝojo kaj kontentigo de mia animo.“

Tio estis lia propra verparolo pri si mem. Kiam mi lin proksimoje vidis, lia „Requiem“-koncerto estis ree donata. Sed malmultaj tagoj

4. E. Delligny, St. Omer, Franc.
5. B. Kötzt, Leipzig, Germ.
6. D-ro A. Möbusz, Lübeck, Germ.
7. E. Gazdik, Spišské Podhradie, Ĉeĥosl.
8. M. Butin, Godesberg, Franc.
9. S-ino M. Tiard, Paris, Franc.
10. Loveček Karel, Holešov, Ĉeĥosl.
11. Salo Grenkamp-Kornfeld, Jaszlo, Pol.
12. O. Berman, Lodz, Pol.
- 13.—14. Ges-oj Privat, Genève, Svis.
- 15.—16. Ges-oj Blaise, London, Angl.
17. C. Jeffery, London, Angl.
18. F-ino M. Reeves, Hastings, Angl.
19. F-ino J. A. Blackman, Hastings, Angl.
20. S-ino J. G. Bramkamp-Weber, Scheveningen.
21. C. H. Bramkamp, Scheveningen, Nederl.

## Brita Esp. Kongreso 1922 en Londono.

La venonta (13-a) kongreso de britaj esperantistoj okazos en Londono (por la unua fojo) je Pentekosto 1922. La organiza komitato atendas grandan sukceson, kaj pretiĝas por la gastigo de almenaŭ mil kongresanoj. Oni esperas, ke ankaŭ multaj samideanoj el aliaj landoj venos por partopreni la feston, kiu okupos kvar tagojn (de la 2-a ĝis la 6-a de junio) kaj estos la plej granda kaj grava nacia kongreso de esperantistoj ĝis nun okazinta en Britujo.

## Literaturajn Konkursojn

aranĝas por 1922 la Brita Literatura kaj Debata Societo. La premioj estas por ĉiu konkurso: 1-a premio 30 ŝil., 2-a premio 20 ŝil.

La temoj estas: 1. Traduko de angla literaturajo de 2-3000 vortoj, 2. originala novelo de 1-2000 vortoj, 3. originala poemo de ne pli ol cent linioj.

Kondiĉoj:

1. Konkursantoj, se membris de la Societo, devas pagi 1 ŝil. por ĉiu manuskripto: se ne-membroj, 2 ŝil. por ĉiu manuskripto.

2. Konkursantoj devas alpreni pseŭdonimon, kiu aperos sur la manuskripto. Ili devas skribi la nomon kaj adreson kune kun la pseŭdonimo sur aparta folio, kaj enmeti ĝin en koverton, sigelante ĝin kaj skribante la pseŭdonimon ekstere. Tiun koverton ili devas sendi kun la manuskripto.

3. Ĉiuj manuskriptoj fariĝos la propraĵo de la B.L. kaj D.S. La Komitato de B.L. kaj D.S. rezervas al si ĉiujn rajtojn pri publikigo de manuskriptoj.

4. La Komitato de B.L. kaj D.S. rezervas al si la rajton, aŭ ne doni, aŭ dividi, iun ajn premion. Se manuskripto de sufiĉa merito estos ricevitaj, medalo aŭ medaloj estos ankaŭ aljuĝataj.

5. Manuskriptoj devas atingi la sekretarion antaŭ februaro 28a, 1922.

Adreso de la Hon. Sekr.: Charles H. Edmonds, „Rockwood“, High Road, Wembley, Anglijo.

## Sudgermana Esperanto-Kongreso

estis aranĝata de la Salzburga Esp.-Grupo en la tempo de 25-27. marto 1922. Dum kaj post la kongreso granda esp. ekspozicio montris la evoluon de nia lingvo ĝis la plej nova tempo. Aliĝojn oni anoncu bonvole al la Salzburga Esp.-Grupo, Mönchsberg 5, Salzburg, Aŭstrio.

## Virinoj.

La Internacia Virina Kongreso Laborista

ĵus kunveninta en Genevo, decidis akcepti Esperanton kiel oficialan lingvon por la venonta kunveno en 1923.

poste mi estis ankoraŭ unu fojon en lia proksimume. Ankaŭ tiam brillegis la templo per lumo, ankaŭ tiam li estis tien enportata, sed tiam en sia ĉerko. Ĝi estis kovrita per florkronoj, la pastro pentris per paroloj solenaj kaj laŭdaj la personecon kaj la vivfaradon de la mortinto, kaj de la ĥoristaro sonoritis denove paroloj de lia propra mortmeso.

*Requiem aeternam*

*dona eis, Domine!*

*Et lux perpetua luceat eis!*

Tiel la blinda majstro estis forlirinta kaj kun li lia nekantita „Te Deum“. Kvankam neatenita kaj forgesita en la vivo, li estis honorata en la morto. Sed al mi li fariĝis la memorajo de io sublima, io granda, kion mi admiras, kaj memorajo de io hela, io belega, pri kio mi ĝojas.

S-o *Thilander* faras ĵenan rimarkon pri al verkinto de la supre citita rakonto:

*Hjalmar Höglund*, naskiĝinta en 1865, mortinta en 1919, estis edukita en la blindulinstuturo en Stockholm. Post okuloperacio lia vidpovo tiom pliboniĝis, ke li povis legi kaj skribi ordinaran skribon. Li ree preskaŭ blindiĝis kaj denove per operacio rehavis sian vidpovon. Li estis profesia verkisto, vivante dum multaj jaroj sole per sia plumo. Kiel verkisto li gajnis famon kaj ricevis premiojn de la Sveda Akademio (literatura) por siaj lertaj skizoj de nordsvedaj naturo, popolo kaj moroj. Sed li ankaŭ skribis grandan nombron da ĉarmaj „verrakontoj“ pri la blinduloj. La pri-skribita muzikisto estis mia instrulisto, kaj mi povas atesti pri lia infanece pia karaktero kaj pri lia milda bonkoreco: *Karl Lundell* naskiĝis en 1859 kaj mortis en 1916.

en tio, ke iliaj elementaj ideoj, t. e. la ideoj de ili reprezentataj estas plene identaj (= ento), sed ke la interelementaj rilatoj al la antaŭiranta vortodono (ĝia karaktero-determina vortelemento) ne estas la samaj: ni diras ke -aj- estas absoluta kaj -o estas atributa vortelemento de enteco.

Klarigo de tiuj nomoj klarigos ankaŭ la aferon: La limsignifon de kunmetaĵo kun -aj- oni ricevas procedante laŭ la konata maniero, aplikata ankaŭ pri -ec- kaj -ad- kaj pri radikoj; tiam de o-kunmetaĵo metante la o memstare (= ento, kaj — se oni flankelastas enportitan de la praktiko nun-anon de signifo — aĵo) kaj sekvigante post ĝi linier citiloj la alian vortodono, tiel ke o estas la atributo kaj kune kun substantivaj radikoj do ideo pleonasma, kune kun adjektivaj rezultigas la respektivan kvaliton (ekzistas esceptoj, kiujn forigi tamen estas neignorebla tendenco de la lingva evolucio) kaj kun verbalaj radikoj la ag-on. Ekz-e ŝtat-aj(o) = (a)jo de (la) ŝtat(o) = ŝtat-a afero aŭ objekto, dum ŝtat-o = ŝtat(o) = (o) aŭ aĵo, ŝtat(i)o = ŝtato; varm-aj(o) = aĵ(o) varm(a) = varma aĵo, dum varm-o = (a)jo „varm(a)“ = kvalito (energio), varm(a) = leg-a(o) = aĵ(o) legata (ev-e leganta), dum leg-o = (a)jo „leg(i)“ = ago „leg(i)“.

El tio rezultas, ke -aj- ne estas uzbla kiel pluformadilo de -o, do ke ekzistas neniu ĝenerala sufiĉa pluformadilo de ĝi; praktike ja ne estas novaĵo, ke „varm-o-a“ (de varmo, termika) ne estas = varm-aj-a (de varmaĵo aŭ -oj).

\*) Ni ecias, ke Antido provas interpreti la fenomenojn kom ale (per diferenco de la elementaj signifoj); v. La Vojo 1921 p. 9a). Tamen ni, legitinte ĉion de li pri diritan, konsideras tre verŝajne, ke konstatinte kun la rilataj detaloj en la unua volumo de nia vortaro, li revizias sian opinion.

Se ne ekzistas ĝenerala pluformadilo, atributa sufiĉo de enteco, tamen oni ofte — laŭ la senco — povas uzi specialajn absolutajn afiksajn de enteco, ree imitante la naĉajn lingvojn. Ekz-e kuir-ej-a (*Millidge*) por „kuir-o-a“ (R povar-skoj, laŭvorte kuirist-a; Ĝi kulturarist); ferur-ist-i (simile sagistil) por „ferur-o“ (iz-, reg-) (G terrorisleren). Ankaŭ radikoj estas uzataj sammaniere; tiel anstataŭ kuir-ej-a oni trovas ankaŭ kuir-art-a. Speciale interesaj estas la pluformitaj partilcipo-substantivoj. Ce ili per praktika konvencio -o estas ne atributa vortelemento (tiam ĝi, ja trovigante post adjektiva vortelemento, rezultigus kvaliton, staton) sed absoluta kaj eĉ speciala kun la signifo de individuo, do sinonimo de -ul: kapt-it-o = kapt-it-ul(o). Kiu forgesis tion, tuj estas rememorigata pri ĝi, kiam li volas adjektivigi (aŭ verbligi) partilcipo-substantivon; restas al li nenio alia, ol reanstataŭi la finaĵon -o per ĝia ĉi-kaza sinonimo, la speciala absoluta sufiĉo -ul-, tiel ke li ricevas ekz-e kapt-it-ul-a kampadejo\*) (resp-e kapt-it-ul-i, kio laŭ analogiaj estus = kondutiĉi kaptitule, esti kaptito).

\*) Tamen ekz-e Esperanto-Praktiko (p. 128) raportas pri la „prezidanta seĝo“ de d-ro Kamaryt en Prago! (Aŭtoro noto de la 20. 10.)

(Daŭrigota.)

## Korekto.

En la antaŭa numero estiĝis kelkaj bedaŭrindaj preseraroj. Legu en la tria alineo, dua linio, „igi“ anstataŭ „ĝi“, kaj kompletigu en la sama alineo, kvina linio, post „glänz-en“ (einen Stoff glänzen). La pledoto en la unua kolono tekstas jene: Kompreneble ĉi tiuj esploroj ne rilatas sole postsekvanter -ig-; sed pro manko de spaco kaj tempo ni povas prezenti nur malmultajn ekz-ojn.



# Kongreso kaj Floraj Ludoj de Kat. Esp. Federacio

Girona (15-16-17. Oktobro 1921).

Kataluna Esperantista Federacio, ĉefa ligilo inter la katalunaj esperantistoj, naskiĝis unu jaron post la V-a Internacia Kongreso okazigita en Barcelono en 1909. La laboroj de tiu ĉi organizaĵo estas longa vico de sukcesoj. Dum la lastaj jaroj de la mondmilito ĝi travivis kelkajn malfacilajn momentojn, kaj nur en lasta jaro ni atingis plenan revigligon de nia supera organismo dank'al la laboremo de kelkaj senlaca batalantoj, kiujn la kataluna esperantistaro elektis kiel gvidantojn. Elokventa pruvo de la reorganizo de K. E. F. estas la ĵus okazigita kongreso en Girona. La grupo „Girona Espero“ prenis sur sin la malfacilan taskon organizi la IX-an Kongreson kaj la VIII-ajn Internaciajn Florajn Ludojn de K. E. F., kaj ni povas certigi, ke la ordo, disciplino kaj laboremo de la organiza komitato estis eksterordinaria. Ni raportos la kongresajn festojn laŭ la difinita programo:

## Sabato, 15. okt.

La urbo Girona akceptis dum la tuta tago gesamideanojn alvenintajn de la apudaj urboj kaj vilaĝoj. Je la 6-a posttagmeze alvenis la plejmulto. Ĉe la stacidomo atendis la alvenantojn ĉiuj enurbaj kaj eksterurbaj samideanoj kune kun la muzikistaro de la milita regimento loĝanta en Girona. Je la alveno de la vagonaro la muziko ludis ĝajgan marŝon, kaj per longa aplaudado oni salutis la multnombre alvenantajn gefederacianojn.

Impona demonstracio formiĝis: la muzikistaro en la unua vico estis sekvata de la standardoj de la ĉeestantaj grupoj kaj de la esperantistoj. Tra la ĉefaj stratoj de la malnova urbo ni iris ĝis la urbdomo, kie ni estis akceptataj de la urbaj aŭtoritatoj. Ĉe vasta salonego sidis en la prezida loko la urbestro, la provinestro, la generalo kaj kolonelo de la urbaj regimentoj, akompanataj de la prezidanto de K. E. F., de tiu de la organiza komitato kaj de aliaj pioniroj de la kataluna movado.

La urbestro salutis la kongresancjn per elokventaj vortoj dezirante, ke la restado de la katalunaj esperantistoj en la gastama urbo Girona estu plej agrabla, kaj ke la laboroj de la kongreso estu nova paŝo al la definitiva triumfo de nia idealo. Nome de la ĉeestantoj respondis s-o Jaime Grau (redaktoro de Kataluna Esperantisto). Post kelkaj vortoj de la provinestro la aŭtoritatoj forlasis la salonon, kaj tuj komenciĝis la malferma kunsido de la IX-a Kongreso.

Pastro Casanovas, prez. de „Girona Espero“ kaj de la Organiza Komitato, salutis la ĉeestantojn per varmaj vortoj.

Post tio la prezidanto de K. E. F., s-o Gili Norta, legis la prezidantan raporton, belan skizon de la estontaj laboroj entreprenotaj de nia federacio.

Sinsekve salutis la delegitoj el 19 ĉeestantaj grupoj el Katalunujo. Same faris la juna samideano H. Günter nome de la aŭstraj infanoj gastigitaj en Katalunujo kaj s-o Percy B. Hudson, aŭstralia samideano, ĉeestanta la kongreson.

Per kantado de nia himno oni fermis la kunsidon.

Tuj post la fino de la malferma kunsido, oni oficiale malfermis la belan ekspozicion de esperantistoj, kiu dum la kongresaj tagoj estis vizitata de la urbanoj kaj kiu vekis ĝeneralan intereson.

Samtempe estis disdonataj al ĉiuj ĉeestantaj federaciaj bela gvidlibro de Girona, lukse presita kaj lerte redaktita de s-ano Josep Dalmau.

Nokte je la 10-a, honore al la kongresanoj, oni ludis koncerton.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukts laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(69-a daŭrigo.)

La bela printempa tago superversis ĉion ĉi tion per helaj sunradioj. En la brusto de Mateo naskiĝis la ne konata ĝis nun forto. La unuan fojon en Ameriko li troviĝis en amaso da homoj, kies sentojn li komprenis, ĉar ĉi tiuj sentoj estis ankaŭ liaj sentoj. Tio plaĉis al li, ĉar strange lin tiklis, naskis en li ĉi tiu deziregon. . . . Li deziris ion plian, li deziris ke oni ankaŭ lin atentu, ekkonu lian estintan vivon, ke oni montru al li saman simpatian, kiun li nun sentas por ili. Li deziris plue ion eksterordinaran, ion ebrigiĝi; al li ŝajnas, ke tuj okazos io, per kio fariĝos pli bone al ĉiuj kaj ankaŭ al li, la Loziŝcano, kiu kiel kudrilo perdiĝis en la fremdlando. Li ne sciis, kien li iris, kion li faros, li forgesis, ke li estas senpasporta senlingvulo, vagulo en ĉi tiu lando. Li ĉion forgesis kaj, esperante pri io, li trapuŝiĝis antaŭen, ebrigiĝita post la literaria soleco per la nuna konscio de sia unueco kun ĉi tiu grandega homamaso en ia komuna sento, kiu ondigiĝis kaj tremadis ĉi tie kvazaŭ la maro inter krutaj bordoj. Li milde rideti dis, parolis ion mallaŭte sed rapide kaj fervo 2 trapuŝiĝis antaŭen, tien, kie staris sub la standardo la viro, kiu tial bone komprenis ĉies sentojn, tiel bone esprimis ilin per sia profunda penetra voĉo . . .

XXIII.

Mi ne scias, kion farus Mateo, se li sukcesus trapuŝiĝi ĝis la platformo, per kio li esprimus al s-ro Hompers la sentojn lin troplenigantajn. En

## Dimanĉo, 16. okt.

Je la 8-a matene ĉe la romarta preĝejo de Sant Pere de Galligans la plimulto de la kongresanoj ĉeestis solenan diservon, kie predikis esperante pastro F. Viver el Torroella de Montgrí. Post la diservo oni benis la novan standardon de la grupo „Studenta Juneco“ el Girona.

La kongresanoj vizitis la muzeon de la preĝejo, kie oni konservas belajn juvelojn el la roma epoko.

Je la 10-a matene ĉe grupo Escolar okazis la labora kunsido de la IX-a Kongreso, ĉeestata de pli ol 250 gekongresanoj

Kiel prezidanto, nia pioniro, s-o Gili Norta, malfermis per malmultaj vortoj la kunsidon kaj s-o Alberich Jofré legis la sekretarian raporton kun detaloj pri la laboroj faritaj dum la agado de la komitato. Ili estis aprobatataj same kiel la bilanco.

Estis legata amaso da salutletoj kaj telegramoj, inter kiuj meritas esti citataj tiuj de samideanoj: Pujulá i Vallés, Delfi Dalmau, Teo Jung, Julio Mangada kaj Ed. Kühnl, prez. de la VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj. (Finota.)

## Oficistaro.

### Internacia Oficista Esp. Asocio.

Dum la XIII-a en Praha okazis krom la fakaj kunvenoj de samprofesiaj oficistoj ankaŭ aparta kunveno de privataj, ŝtataj kaj komunumaj oficistoj, kiun ĉeestis reprezentantoj de dek ŝtatoj kaj de ok fakoj de la ŝtata (administracia) aktiveco

Ĉar oni ne povis preparoli ĉion dum la kongreso, oni bonvolu sin turni al la adresoj apude indikitaj por diskuti ĉion letere. Pri ĝeneralaj ŝtataj demandoj oni sin turnu al la sekretario.

Ĝis nun aprobis sian kunlaboron samideanoj el landoj Sveda, Germana, Ĉeĥoslovaka, Hispana, Finna, Nederlando, Itala, Hungara, Pola, Rumana, Turka, Kuba, Urugva kaj el Aŭstralio.

La dividu de laboro laŭfako; por komerco Adolfo Oberrotman, komerca reprezentanto, Varsovio, Krak-Przedm. 10, por industrio Juljano Jarecki, industriisto, Varsovio, Złota 56 a, por bankoj Henk Goemans, departamentestro, Banque Hollandaise pour la Méditerranée succursale de Constantinople, por komunumaj oficistoj Otto Rösch, oficiale direktoro de la Saksa Fajrasekura Ĉambro en Radebeul, por ŝtataj oficistoj Stefan Lubliner, Kapitano en la ministerio de Eksterlandaj Aferoj, Varsovio, Zgoda 9, por juĝistoj Jozefo Litauer, helpjuĝisto, Varsovio, Marszalkowska 81.

## El Pola Lando.

### Esperanto-Asocio de Polujo (EAP)

estas fondita la 1. nov. en Bydgoszcz. EAP (laŭ sia „fundamenta artikolo“) estas organizaĵo nacie, religie kaj politike neŭtrala kaj celas 1. arigi ĉiujn esperantistojn de Polujo en unu forta organizaĵo, 2. per komunaj fortoj labori por la plifortigo de Esperanto bazita sur la Fundamento de d-ro Zamenhof en Polujo. Adreso: Bydgoszcz, Kordeckiego 1a.

## Katolikaro.

En Bremen (Germ.) s-o Egon Higgen fondis katolikan esp. societon. Kiel prezidanto estis elektita s-o Möllmann, instruisto, Bremen, Lütowerstr. 73.

## Kelneroj.

Esp. kurson por 10 kelneroj gvidas s-o koncertmajstro Schmied en Salzburg, Aŭstrio.

lia lando simpluloj havas la kutimon esprimi sian amon, sian respekton al surtute vestitaj<sup>99</sup>) viroj per profundaj, preskaŭ ĝisteraj salutoj kaj per mankiso. Povas esti, ke ankaŭ s-ro Hompers ricevus nun la saman elmontron de miro pro sia oratora talento, se la fatalo ne ŝanĝus la cirkonstancojn tiamaniere, ke sur la vojo al s-ro Hompers la Loziŝcano kunpuŝiĝis kun s-ro Hopkins, estinta boksisito kaj nuna policano. S-ro Hopkins kun aliaj sinjoroj en griza kaskoj kaj kun bastonoj en la manoj, staris senmove kiel statuo kaj komprenoble tute ne estis kortuŝita per la elokventeco de s-ro Hompers. La polico de Nov-Jorko bone konis ĉi tiun popularan oratoron, kaj la efikon de liaj paroladoj ĝi taksadis laŭ sia propra vidpunkto. Ĝi sciis, ke s-ro Hompers estas homo sperta kaj neniam en siaj paroladoj li „rompis la ordon“. Sed ne malofte efiko de liaj paroladoj estis tia, ke la aŭskultantaro rompis la ordon. La senlaboruloj havas al tio apartan inklinon kaj krome tiu arbo, de kiu la polico hodiaŭ ne prosperis ĝustatempe forpreni la pendigintan vagulon, tro longe restintan tie „tute sen ia ordon“, speciale impresis la homamason. Ĉar la hodiaŭa meeting-o estis eksterordinare multe homa, ĉiu policano en okazo de malordo havus kontraŭ si centon da kontraŭbatalantoj. En similaj okazoj la polico streĉe atentis, observante pleje la alilandulojn. Tiel longe kiel ĉio restas en ordo, — kaj la ordo restas, dum oni kontentigas sin per paroloj, kvankam plej teruraj, per gestoj plej dramecaj, — la policanoj staras kviete, permesante al si eĉ signojn de aprobo ĉe plej trafaj partoj de la parolado. Sed tuj kiam en tiu parto de la homamaso montriĝas intenco transiri al faroj kaj „rompi la ordon“, la polico tuj okupas la profit-

<sup>99</sup>) Vilaĝanoj de tiu regiono ne portas surtutojn, tiel ke surtuto estas tie rigardata kiel apartenaĵo de sinjoro.

## Fervojo.

### Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF).

Dum la XIII-a refondiĝis la IAEF. Ĝia celo estas: Propagando kaj instruado de Esperanto; eldono de faka vortaro (terminaro) kaj de universala fakgazeto ilustrita; fine, klopodo plifaciligi al la geasociatoj kaj iliaj familianoj la vojaĝadon kaj restadon en fremdlandoj.

Nepre necese estas, ke ĉiuj gefervojistoj baldaŭ aliĝu, ĉar ni bezonas ĉiujn kiel batalantojn kaj helpantojn.

Aliĝojn akceptas la sekretario, fervoja inspektoro Josef Blazek, Olomouc (Ĉeĥoslovakio), Müllerstrasse 266. Ĉiujn mensendadojn — en nacia mono — al la kasisto, fervoja revizoro Emanuel Kubasek en Pizen (Ĉeĥosl.), Loberska ul., Prov. domy Skup. B-1-68. Kolegoj, kiuj estas emaj kunlabori je la faka vortaro, anoncu sin al la subskribinto. Membrokartoj kaj la menciita fakgazeto estos sendataj al ĉiuj gepagintoj.

Georg Habellok, ferv. insp. prezidanto de IAEF

Breslau 10 (Germ.), Schleiermacherstr. 19.

## Polico.

La unua polica estraro de la mondo oficiale korespondanta per Esperanto.

La polica estraro de Dresden, Germ. sekvis la proponon de la loka unuigo de GEA aranĝante oficon por esperantlingva korespondado. Do ĝi nun korespondas kiel unua polica estraro de la mondo oficiale per Esperanto.

## Turismo.

### La Klubo de ĉsl. Turistoj

ĉefa turista organizaĵo en la Ĉeĥoslovaka respubliko, havanta 21000 membrojn en 142 sekcioj en ĉiuj grandetaĵaj urboj de la ŝtato, decidis la 4. okt. 1921 (n-o 6630) fondi ĉe sia centro en Praha „Esperantan Societon“, celantan propagandi la turismon inter la esperantistoj kaj pere de Esperanto disvastigi en fremdlando la scion pri la turista ĉsl. movado kaj naturaj belajoj de la ĉsl. respubliko.

## Junularo.

La Breslau'a Esp. Gejunularo aliĝis kun 35 membroj al la Asocio de Junaj Germ. Esperantistoj (AJGE). La venonta unuigo tago estos en Breslau okaze de la XI-a Germana Esp. Kongreso 1922. La delegito de Universala Esp. Asocio Junulara (UEAJ) estas por Silezio: s-o A. Hirsemann, Herzogstr. 36, Breslau; por Breslau: s-o Erich Habellok, Schleiermacherstr. 19. Ĉiuj dezirantaj korespondi kun gejunuloj skribu al s-o E. Habellok.

## Lernejo.

### Esperanto ĉe germanaj altlernejoj.

En la esp. kursoj ĉe la Popola Altlernejo en Nürnberg partoprenas pli ol 60 personoj. Ĉe la Komerca Altlernejo komenciĝis la prelegoj de prof. d-ro Ledermann pri „Historio de la mondlingva movado“; krome li gvidas seminarion por progresintaj esperantistoj, kiun partoprenas, inter aliaj, 22 profesoroj kaj ĝelnstruistoj de urbaj kaj ŝtataj lernejoj. En sia inaŭguracia prelego prof. L. paroladis antaŭ multnombre aŭskultantaro pri la aktuala temo: „Ĉu Esperanto rajtas postuli katedron?“

En Essen s-o Pillath komencis la esp. instruadon ĉe „Akademijaj Kursoj“ (oficiala urba instituto) kun 60 aŭskultantoj. Instruilo: Kursa Lernolibro de E. Privat. Daŭro de la elementa kurso

donan pozicion de atakanta partio, la bastonoj komencas rapide, senŝanceliĝe labori kun plej bedaŭrindaj ofte neatenditaj sekvoj. Kaj dekmiloj da homoj retiriĝas antaŭ unu — du centoj da bastonoj kaj diskuras, ŝirmante por ĉia okazo la kapon per la manoj.

Mateo Lozinski kompreneble ankoraŭ ne konis je sia malfeliĉo la lokajn kutimojn. Li nur trapuŝiĝis antaŭen kun malfermita koro, kun laŭ paroloj sur la lipoj, kun espere en la animo. Kaj kiam al li subite sin turnis altkreska sinjoro en griza ĉapo, kiam li ekkonis en li la hieraŭan policanon, li esprimis al li ĉiujn sentojn, lin troplenigantajn, sentojn de homo malĝojigita, ofendita, senhelpa kaj esperanta al les helpo. Unuvorte, li kliniĝis kaj volis tuŝeti la manon de s-ro Hopkins per siaj lipoj.

S-ro Hopkins forsaltis, kaj lia bastono fajflis en la aero . . . forte sonts kaj eĥis la unua frapo . . .

La Loziŝcano levigis kiel furioza urso. Sango fluis de sur lia vizaĝo, la ĉapono li perdis, liaj okuloj aspektis sovaĝaj. Li estis nun pli terura, ol lastfoje en la loĝejo de Bork. Hodiaŭ malestis homa forto, kiu povus lin haltigi. La neatendita ofendo kaj doloro troplenigis la pokalon de pacienco en la animo de la granda, forta kaj mildakora viro. En ĉi tiu frapo por li alcentriĝis ĉio, kion ĝis nun li estis travivinta, trasuferinta, trasantinta en ĉi tiu urbo, la tuta malamo kaj kolero de vagulo, ĉasata kiel besto.

Mi ne scias, ĉu s-ro Hopkins konis la indanan frapon de Paddy, ĉiukaze li ne povus trovi la tempon por ĝin uzi. Antaŭ li levigis io grandega, sovaĝa, levigis, kovris lin, kaj la policano Hopkins falis teren, meze de la homamaso, kiu en sia plena tuteco jam tumultis, jam bolis . . .

(Daŭrigota.)

15 vesperoj po 1 1/2 horoj. Post ĝi okazos sinsekve du progresigaj kursoj ĉe la sama instituto. Pro tio la Esp.-Grupo de 1910 rezignas la aranĝon de propraj kursoj. — Ankaŭ ĉe la urba Popola Universitato Esperanto estos instruata sekve de iniciato farita de la laborista grupo. La Urba Biblioteko mendis esp. librojn.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

**Grupo „Lemana Stelo“ en Montreux, Svizl.** organizis la 1. okt. vesperfesteton por propagando kaj amuzo, kiu donis al la grupo netan profiton de pli ol 200 frankoj. Vizitis la feston s-o Holter, del. de UEA en Genève.

### Egipta Esp. Asocio

okazigis paroladon de sia prezidanto s-o Gagnatelli, inĝen. sekretario de la itala komerca ĉambro. Kasisto estas s-o Antoine Kahla, advokato de la urba konsilantaro, sekretario s-o Wilken, advokato, Farahdestr. 4, Alexandria. La membroj estas francoj, angloj, italoj, grakoj, koptoj, sirianoj, araboj, rusoj, turkoj, armenoj.

### En Malmö, Svedlando

Esperanto nun ankaŭ progresas. En Popoldomo paroladis s-o Peterson kaj Jönsson antaŭ 200 personoj. Post bona sukceso de interesa eksperimento pri la taŭgeco de Esperanto por la tradukado nun funkcias kurso por 40 komencantoj kaj daŭriga kurso por 20 personoj. Festo okazis kun 75 p. — Ankaŭ esp. kurso ĉe la kristana grupo.

### En Haapsalu, Estonio

nia afero progresas. Ĝis aŭtuno 1920 estis nur unu esperantisto en la urbo, nun jam estas (kun la lernanto) ĉ. 50. En la monata seminaria gazeto la lernanto A. Säin aranĝis esperantan anguleton. — ET oni disvendis semajne po 15 ekz.

### Pola Esp. Societo en Lodz

havis la honoron gastigi s-inon Cense el Paris dum ŝia semajna restado en nia urbo. S-ino Cense, en parolado farita antaŭ multenombra aŭskultantaro, informis pri la dumilita kaj nuna stato de Esperanto en eksterlando, pri detaloj, malfacile akireblaj el la gazetaro.

### Nova esp. grupo

fondiĝis en Recklinghausen, Germ. La kunveno okazas ĉiutage je 8-10 h.

### El Hispanio.

Esp. Grupo „Lumo“ en Tarrasa malfermis ses esp. kursojn: por viroj ĉe la sidejo de la grupo, ĉe Centre Dependents Comers i la industria, ĉe Respubl. Societo (Popola Domo) ĉe Hora Societo „La Juventud Tarrasense“, por fraŭlinoj kaj infanoj ankaŭ en la sidejo de la grupo. Entute 90 gelnlerantoj. Por la propagando la grupo eldonis „Terrassa Esperanto“. Vizitis la grupon la aŭstralia samideano s-o Hudson, je kies honoro estis organizata lunĉo.

### Belgio.

En Liège kurso en ĉambro de la Universitato, de s-o Sibille; en Ongrée kurso de s-o Dechene.

### Franclando.

La 22. okt. s-o Archdeacon faris propagandon en la Jura Lernejo de Limoges, organizitan de la tiea esp. grupo, antaŭ 300 ĉeestantoj.

La 26. okt. propaganda parolado de s-o Daniel Eyquem en Villeneuve-St. George apud Paris.

La 8. okt. la esp. grupo de Mulhouse (Mülhausen) organizis vesperfeston en la Borso, kiun ĉeestis ankaŭ la urbestro. Prop. Parolado de s-o Schneider kaj teatraĵo „Onklo Tip-Top“.

### En Karlsbad, Ĉsl.

s-o instruisto Wünsch komencis kurson kun 20 personoj, inter ili 10 gelnstruistoj kaj kuracistoj. En Meierhöfen apud Karlsbad s-o instr. Hajek faris paroladon kaj fondis grupon kun 47 membroj. — En Hohenelbe komencis en oktobro du kursoj kun 37 personoj.

## Gazetaro.

### FRANCAJ GAZETOJ.

La Bulteno de la Franca Komerca Ĉambro en Stockholm, eldonata en Paris, okt. n-o 22. (Kroniko de esp. movado.) La femme et l'enfant, Paris. (Kurso de Esp. kaj propaganda artikolo.)

Le Progrès Civique, 29. 10. (Esp. kaj Int. Lab. Ofiĝejo.) Le Cuir, teknika eldono n-o 1519. (Esp. kaj Scienco.)

Le Montleur de l'Oise, Beauvais. (.Germ. propagando por S-Silezio per Esp.)

### GERMANAJ GAZETOJ.

Esp. angulojn aŭ artikolojn pri Esperanto enhavis sekv. ĵurnaloj:

Weinbhaer Zeitung, 27. 9. Oelsnitzer Tageblatt, 4. 10. 16. 10. Kirchnerberger Tageblatt, 4. 10. 9. 10. Der Werrabote, Meiningen, 5. 10. Meininger Tageblatt, 5. 10. Auerbacher Zeitung, 8. 10.

Freytag, Berlin, sept.-okt. (Artikoleto en Esperanto.) Rheinische Zeitung, Köln, 27. 10. (S-o Hurler trafis refutas la poridan artikolon de s-o Peus en la sama ĵurnalo de 16. 10.)

Recklinghauser Zeitung, 28. 10. (Artikoleto.)

### ALILANDA GAZETARO.

La Wallonie Socialiste, Liège, Belgio, 29. 10. (Poreperanta artikolo „Por la Alproksimiĝo de l' Popoloj“ de F. Derigat.)

Le Soir, Bruxelles, Belgio, 2. 10. (Artikolo.) Deutsche Tageszeitung, Karlsbad, Ĉsl., 28. 10. (Artikoleto.)

Messezeitung, Reichenberg, Ĉeĥosl., 15. 10. The Warwick Daily News, Warwick, Queensland, Aŭstralio 9. 9. (Kun traduko de „Letero el Bulgario“, el ET.)

Postimees, Tartu, Estonio, 19. 10. (2 notoj.)



# Recenzejo.

## LIBROJ.

ESPERANTISTA AKADEMIO. Ĵus eliris la Dua Cirkulero de la Direktoro por la Scienda kaj Teknika Vortaro (parte publikigita en ET n-oj 50/51) kaj la Raporto de s-o Direktoro de la Sekcio por Komuna Vortaro (publikigita en ET n-o 48). — Supozeble la al ni senditaj broŝuroj estas nur presprovaĵoj, ĉar ili enhavas ankoraŭ diversajn preserarojn.

COURS RATIONNEL ET COMPLET D'ESPERANTO. Préface de Henri Barbuisse. 13 x 20 cm. 208 pg. broŝ. en ruĝa kovrilo. Prezo afr. 5,50 fr. fk. Havebla ĉe Fédération Espérantiste Révolutionnaire, 25 bis, rue Morère, Paris 14. 1921.

Ni povus esti tre kontentaj, se ekzistus nur tiaj instru-libroj, kia estas la jena por la franclingvaj laboristoj. Ili danku la verkinton kaj ĉiujn, kiuj per malavaraĵoj mondonacoj ebligis la eldonon de la kompleta gramatiko.

Henri Barbuisse desegnas en la antaŭparolo la konturojn de Esperanto kiel idealon socialan kaj moralan de l' nuntempo. Li finas dirante, ke ĉiu socialisto devas esti esperantisto.

Per klarigaj vortoj la aŭtoro en aparta ĉapitro enkondukas la lernanton en la historion, esence kaj celon de nia lingvo. La sekvanta ĉapitro konsistas el 29 lecionoj, aldono de la radikaro esperanta kaj vortaro franca-esperanta. La finlerninto estas invitata al aliĝo al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) per la alvoko: Ni estu vere internaciistoj!

Antaŭ ol komenci la lecionojn, la verkinto laŭdirde (kaj tre imitinde!) donas resumon pri la franca gramatiko koncize kaj klare, por ke la lernanto ree konatiĝu kun la reguloj de la lingvo gepatra, kies funda kono faciligas la lernadon de artefarita — kaj tamen vivanta — lingvo. Prepara leciono parolas pri la alfabeto, la akcento kaj la prononcado (laŭ 3-a aldono al U. V. ne plu: prononcado!).

Ĉiun lecionon ornamas bildoj, kies parte genia kunmeiĝo komprenigas eĉ ĉiujn lingvaj malfacilaĵojn al ne tre inteligenta persono. Ili bonege povas anstataŭ la instruiston, jam pro tio, ke la klarigoj estas abundaj. Sed laŭ la aranĝo la gramatiko estas destinita por kursoj.

Speciala ĉapitro priluktas idiotismojn pensante la lernanton en Esperanto kaj ne en la gepatra lingvo, se rilatas al tradukoj farotaj.

Eble ne estis necese envicigi en la afiksaron la ankoraŭ ne oficialajn afiksojn -lo kaj mis-, kies aplikon la Akademio ĝis nun ne decidis.

Mi ne dubas, ke la komunista laboristo ĉerpos grandan utilon el la praktika libro. (G. Ajul.)

UNUA KAJERO (Nova-Tempo-Libretaro). Aŭstria kolekto de legindaj rakontetoj, fabeloj ktp. Eldonejo Nova Tempo, Wien VI. Mollardgasse 55, Aŭstrio, 1921. 12:19 cm. 32 pg. Prezo broŝ. 30 aŭstr. kr., 3 germ. mk., 0,50 sv. fr.

La eldonojo Nova Tempo (societo kun limigita garantio) aperigis la unuan volumeton de sia libretaro konsistantan el anekdotoj diversspecaj. La bonege presita libreto tre plaĉas. Ankaŭ la lingvo estas ne riproĉinda esceptinte kelkajn negravajn malfacilaĵojn. Germanismo, t. e. nur komprenebla al germanoj, estas la vorto „illussvarmistino“ („Lindenschwärmer“). Oni nomu papillon per zool. faka esprimo. (G. Ajul.)

LA KIALO DE LA VIVO. Tradukita el la franca lingvo. Pressa Esperantista Societo, Paris, rue Lacépède 35. — 10 1/2 x 15 cm. 16 pg. Prezo ne monrita.

Jam en 1907 aperis ĉi tiu eta broŝuro, kiu estas vendata por la propagando de Esperanto inter blinduloj; ĝi temas pri la celo de l' homa vivo, pri etiko kaj moralo laŭ teozofia vidpunkto. — La enhavo mediligos ĉiun, kiu sin okupas pri la esencaj demandoj de nia esteco. (G. Ajul.)

## GAZETOJ.

TERRASSA ESPERANTO. Okt. La unua numero de serio da propagandaj folioj de Esp. Grupo „Lumo“ en Terrassa, Katalunio. Kiel propagandfolion ni salutas ĝin; sed se ĝi volus esti nova gazeto, ni devus forte malaprobi ĝian aperon; ĉar jam ekzistas en Katalunio du esp. gazetoj, el kiuj ni delonge ne vidis la solidajn gravan esperable malaperintan por la bono de la solidareco en nia movado.

KRISTANA ESPERO. Julio-okt. Adreso: Laihia, Finn. Kun multaj artikoloj kaj poemoj speciale interesantaj kristanojn, kaj kun aldono: Dia Regno.

LA SUDA KRUCO. Aŭg.

## Abonejoj de ET

en la landoj

- Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
- Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
- Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralov.
- Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
- Finna: O. J. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
- Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
- Litova: Paŭlo v. Medem, Smellig-ve 12, Kaunas (Kovno).
- Pola: Adolfo Oberroman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
- Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
- U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

## Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

La plej granda hungara banko kun interrilatoj en ĉiuj landoj. Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung. kr. 9 000 000 000. Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr, Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Pozsony, Satoraljaujhely, Szabadka, Temesvár.

Prizorgas ankaŭ ĉiajn banknegocojn por Slovakio kaj Transilvanio per siaj tiaj filioj. Per ĝiaj entreprenoj eksporto kaj importo de diversaj artikoloj!

Eksportado

Importado

JAPANA

# ESPERANTA KOMERCA KORPORACIO

JOKOHAMA, JAMAŜITAĈO 80

## 日本エスペラント貿易商會

輸出輸入商

横濱市山下町七十番

### Korespondado ekskluzive en Esperanto

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.

Reprezentanto: R. Kreuz, Frankfurt a. M. (Germ.), Hedderichstr. 75.

## Anoncetoj.

GEEDZIĜO. Gesinjoroj Izabella kaj Roman Sakowicz salutus post sia edziĝo. — Nowogrodek, Pol., ul. 3 Maja (57) 4.

ESP. KABAREDO VERDA KATO, 7, rue N. Dame de Bonne Nouvelle, Paris, Brasserie Andrea, la 9. nov. interalie prezentos „Nia Deklira Kompreso“, gajan revuon en 20 scenoj de R. Schwartz. Gastoj bonvenaj.

GRAVA ALVOKO. Aranĝonte unuan en Pomeranio esp. ekspozicion, mi petas varmege kaj insiste ĉiujn klubojn esperantajn, redaktejojn, librojn, firmojn uzantajn Esperanton kaj privatajn personojn helpi nin per alsendo de gazetoj, libroj, broŝuroj, dokumentoj, prezaroj komercaj, specimenoj ktp., unuvorte per alsendo de ĉio, kio povas antaŭenpuŝi nian aferon. Al ĉiu sendanto mi esprimas miajn plej samideanajn antaŭdankojn. — F. Sielke E. J., del. de UEA, Gdanska 25, Kartuzy (Pomeranio), Polonio.

RUSAJ SAMIDEANOJ! Kiu povus sciiĝi s-inon Antonino Merinova, ke edzo en Hungario ŝin atendas kun malpacienco? (Antaŭ tri monatoj ŝi loĝis en Aul apud Sempalatinok.)

ET n-ojn 1—7 ni reprene liveronte anstataŭ ili senpagan abonon de 1. jan. ĝis 31. junio 1922. Proponojn petas per poŝtkarto la administrato de ET en Köln-Horrem, Germ.

ET n-ojn 1, 2, 6, 7, 11, 12, 13 de 1920 estas dezirataj por Finnlanda Esp. Biblioteko. Kiu povas donaci ilin? Proponoj al Esp. Oficejo Finnlanda, Kasarminkatu 20, Helsinki, aŭ al la administrato de ET.

ESTONIO. Esperanta oficejo petas pri alsendado de specimenoj de esp. ĵurnaloj kaj aliaj esperantaroj kun komunikado de kondiĉoj por opa vendado. Bezonas same katalogojn (en la aĵn lingvo) pri agrikulturaj maŝinoj ĉiuspecaj, de traktoroj kaj ventmotoroj ĝis inkubatoroj kaj butermaŝinoj. — Estonio, Vazalemo, H. Janverk.

S-o N. A. HENDLER en Bydgoszcz, Pol.! Sendu al mi klaran adreson, ĉar leteroj senditaj de mi al vi revenis ne trovinte vln. — Sulio Lehtinen, Laihia, Finnlando.

LIBRO-AMANTOJ ATENTU! Kiu estas amanto por antikva Luther-biblio, presita en 1585 de Hans Lufft? Prezproponoj al Marg. Schoske, Breslau, Germ., Schweidn. Stadtgraben 1 (65).

TEKSAĴOJ. Samideanoj acetas teksaĵojn ĉe Otto Melster en Ronsdorf, Germ. Petu proponojn.

„BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj“, 3-a eldono, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj, estas ricevebla ĉe la eldonaĵo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., por 10.50 germ. mk. aŭ 7 resp.-kup.

ĈIUN NOVAN ESP. LIBRON kaj aliajn esperantaĵojn sendu kun notita prezo al esp. vendejo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov.

PLUMDESEGNAĴOJ, motivoj de Praha ktp., proksimuma formato 17 x 25 cm, prezo 40-60 kč. Portretoj per karbo desegnitaj de 100-200 kč. (20 x 30 cm). Proponoj por esp. glumarkoj. — Georgo Bohutinsky, pentristo, Praha II, Palackeho nabrezi 1672-56 n.

GEJUNULOJ! Manuskripto rondiranta estas fondata. Gejunuloj verkemaj sin turnu, aldonante se eble poŝtm. por respondo, al H. Seppik, Tallinn, Manesi 7—12, Estonio.

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj jenaj fraŭlinoj en la hispana urbo Tarrasa:

- Basilia Montull, str. San Quirico 47
- Tuli Ubach, str. San Antoni 45 bis
- Magdalena Soler, str. Serrano 7
- Adela Perarnau, str. Mayor San Pedro 27
- Maria Plans, str. Topete (Estanco)
- Oler, str. Viveret 17
- Sofia Chaler, str. San Mariano 124
- Kornelia Juvinkel, str. San Mariano 124.

S-o Manuel Noelle Güell, General Arenales F. O. P., Argent., Sudameriko, deziras interkorespondi kun samideanoj ĉiulandaj per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr., pri iaj temoj, precipe pri socialista movado; ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn, revuojn, librojn esperantajn ktp.

S-o A. Schutsky, 8015 Lyons Ave., Philadelphia, Pa., Usono, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Anatolio Lahovskij, 14-jara, Petrograd, Rusio, Zabalkanskij 20, deziras korespondi france, ruse kaj germane per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun eksterlandanoj pri ĉiuj temoj.

S-o Ad. Houben, Kattenberg 28, Borgerhout, Antwerpen, Belgio, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

John Tew. Eyck-Hinkel deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj. 2520 Channing Way, Berkeley, Kalifornio.

F-ino Collignon, 10, rue Fauret, Paris 18, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-ino Chauvier, 110, rue de Sèvres, Paris 15, interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Cugliolo Jean, 5 Avenue de la Liberté, Courbevoie (Seine), Franc., interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o ing. Leopold Berger, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, esperantaĵojn; kolektas adresojn por sia „BES-a Adresaro“.

Erwin Thun, Grottau 417, Bohemujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn (bfl.) kaj gazetojn kun ĉiuj landoj.

S-o Br. Kruszczyński, Bydgoszcz, Pol., ul. Siemiradkiewo 20, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Benjamin Nasielski, lernanto, Graniczna 8, Warszawa, Pol., korespondas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Kiu pola samideano interŝanĝus kun mi la „Tygodnik Ilustrowany“ kontraŭ iu ajn germana ĵurnalo semajna? B. Wachowski, Essen-Dellwig, Kraienbruchstr. 63a, Germ.

Kiu deziras aĉeti bonan poŝtmark-kolekton de Meza Litovio (de generalo Zeligovski), skribu al S. Giller, Wilno, ul. Akademicka 5/42. Mi sendas 66 malsamajn pecojn por kvin (5) francaj frankoj.

Haapsalu, Estonio, A. Kook, Kalda 31, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o B. Szepessy, Hungario, Miskolc, Arany J. u. 29, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. — Por 100—200 poŝtmarkoj mi donas saman kvanton da hungaraj poŝtmarkoj aŭ povas rekomenci laŭ la valorigo de l' katalogoj Sent 1921, Michel 1920 (por eŭropaj poŝtmarkoj) kaj J. et T. 1920. Difektaj poŝtmarkoj estas maldezirataj. Unuafoje sendi mi ne povas, sed nepre rekomencos ĉiujn sendantojn.

Kalmano Papp, Hungario, Püspökladány, korespondas kun geinstruistoj de la tuta mondo. Krome kolektas poŝtkartojn arte reproduktitajn.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondemulojn por ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, precipe pedagogia; donas komercajn informojn.

Hans Stöcker, Düsseldorf, Germ., Gustav Poenskenstr. 4, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj kun la tutmondo.

Hubert Braun, Köln, Germ., Burgunderstr. 57, interŝanĝas poŝtmarkojn. Ekstereŭropaj estas precipe agrablaj, sed ankaŭ eŭropaj estas dezirataj.

Juna lignaĵisto deziras korespondi kun samfakuloj el la tuta mondo. Adreso: Wilhelm Lunz, Nürnberg, Peter-Henlein-Strato 30, Germ.

Max Spahn, Düsseldorf, Collenbachstr. 75, Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj.

Fraŭlo Friedrich Hahn, Eichenpromenade 19, Perleberg, Germ., deziras korespondadon nur kun fraŭlinoj ĉiulandaj kaj „Buddhistoj konvinkitaj“ ĉiulandaj per poŝtkartoj kaj leteroj.

F-ino Wilhelmine Theileis, Düsseldorf (Germ.), Johannstr. 18, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.).

S-o Hans Schwidergoll, Wilhelmstr. 5, Oels, Silezio, Germ., deziras korespondadi per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr. kun samideanoj en ĉiuj landoj.

S-o Rudolf Hobijs, Parkstr. 2, Oels, Silezio, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, esp. sigelmarkojn kaj esp. gazetojn. Mi korespondas angle aŭ esperante.

Grandkomercejo de Furnirligno. Lignolado (Surglutaĵoj) Lignajoj. Eksporto al ĉiuj landoj. Reprezentantoj serĉataj.

**Julius Reinmann & Co.**  
Germanio. Freiburg i. Br. Germanio.

**Artajo-, Bildo-, Libro-**  
**Vendistoj kaj Art-**  
**Amikoj,**  
kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al  
**SEPP OSTERER, GRAZ, AUSTRIO,**  
Gleisdorfergasse 5.  
Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

En Decembro aperos n-o 12 de  
**LITERATURO**  
Kvaronjara Literatura Gazeto Esperanta.

En tiu numero aperos, inter aliaj interesaj:  
1. Traduko de **La Forpaso de Arturo**, el la verkoj de la fama angla poeto Tennyson. La traduko estas farita de f-ino L. Briggs, kiu per ĝi gajnis oran medalon de la Brita Literatura kaj Debata Societo.  
2. Artikolo pri **Infana Esperanto**, de s-o M. C. Butler, kun multaj interesaj ekzemploj de infana parolado.

Kun ĉiu ekzemplero de la gazeto estos donata bela portreto de la infanoj preparolataj.

Ne estas necese atendi por abonon. Tion vi povas fari tuj, kaj tiuokaze vi ricevos ankaŭ n-on 11 (per kiu via abono komenciĝos).

Abonprezoj por la sekvantaj landoj nun estas (por kvar kvaronjaraj numeroj):

- |                   |                    |                      |                  |                   |                        |                 |                  |                   |                          |                       |                     |                   |                  |
|-------------------|--------------------|----------------------|------------------|-------------------|------------------------|-----------------|------------------|-------------------|--------------------------|-----------------------|---------------------|-------------------|------------------|
| Belgujo 4 frankoj | Danujo 2.50 kronoj | Egiptujo 12 piastroj | Franco 4 frankoj | Grekujo 5 drakmoj | Hispanujo 3.50 pesetoj | Japanujo 1 jeno | Kanado 50 cendoj | Meksikio 1 dolaro | Nederlando 1.50 florenoj | Norvegujo 2.50 kronoj | Svedujo 2.50 kronoj | Svisujo 3 frankoj | Usono 50 cendoj. |
|-------------------|--------------------|----------------------|------------------|-------------------|------------------------|-----------------|------------------|-------------------|--------------------------|-----------------------|---------------------|-------------------|------------------|

Abonantoj en aliaj landoj devas sendi 2 ŝillingojn kaj 6 pencojn en angla mono aŭ 12 resp.-kup.

**Charles H. Edmonds, Wembley, Angl.**  
Administranto,  
„Rockwood“, High Road.

**VITRO-PENTREJO**  
Emil Weiler, Freiburg i. Br.  
Emmendingerstr. 30 \* (Germ.)

Speciala Laborejo por unuakvalitaj pentritaj fenestro-bildoj en belegaj koloroj sur brulumita vitro. Arta fabrikado garantiata.  
**Profanaj kaj religiaj motivoj ĉiuspecaj.** Tuja livero. Bildspecimenoj kaj prezoj laŭ deziro.  
Reprezentantoj serĉataj en ĉiuj landoj.

## Korespondantoj! Atentu!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron, posedi fotografajn de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi liveri por tiu ĉi interŝanĝo tre malmultkostajn belajn vizitkartojn kun via fotografaĵo. Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 30 mk., kun kompleta adreso 35 mk. Formato 95 x 45 mm. Farotaj laŭ ĉi ajn fotografaĵo, kiu estos resendata sendifekte. Livertempo 2—3 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

**Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.,**  
Antonstr. 31.

Ĵus aperis 3-a eldono de  
**BES-a Adresaro de Esperantistoj**  
el ĉiuj landoj  
Bela praktika manlibreto, 90-paĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. — Prezo 10.50 Mk. germ., alilande 1.50 Fr. sv., pagebla en poŝtmarkoj aŭ resp.-kup. Aliĝu tuj al 4-a eldono! — Enskriba kotizo 7 Mk. germ. (1 Fr. sv.), kun adresaro 10 Mk. germ., kun propra portreto 24.50 Mk. germ.  
**Anoncu en 4-a eldono!**  
1/4 paĝo 56 Mk. germ. (8 Fr. sv.). 1 linio 7 Mk. germ. (1 Fr. sv.)  
**Bohema Esperanto-Servo Moravany, Bohemujo.** Ĉeĥoslovakujo.  
Reprezentanto por Germanujo:  
**Oskar Ziegler & K-io., Marktredwitz, (Oberfr.)**